

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

# Periodigo de Esperanta literaturo: la malfacila tasko

**Por:** Rafael Henrique Zerbetto[21]

rhzerbetto@yahoo.com.br

**Resumo (EO):**
Esperanta literaturo havas tre specifajn trajtojn, kiuj devenas de la specifaĵoj de la lingvo kaj ĝia kulturo: aŭtoroj kaj legantoj kiuj apartenas al malsamaj kulturaj medioj, la rolo de Esperanto kiel dua aŭ tria lingvo de preskaŭ ĉiuj siaj parolantoj, dum kreiĝas propra kulturo ligita al la lingvo kaj ĝia tutmonda parolkomunumo. Periodigo de esperanta literaturo riveliĝas granda defio pro la malfacilo distingi la momentojn kaj eventojn kiuj draste influas tiun literaturon kiel tutaĵo. Evidentiĝas pli granda interkonsento inter aŭtoroj pri la pli fruaj periodoj, dum diverĝoj estas akraj pri la lastaj periodoj, kio ŝajnas esti konsekvenco de la malfacilo kompreni fenomenojn ankoraŭ okazantaj aŭ kies influo ne estas entute komprenata.
**Ŝlosilvortoj:** Esperanto; literaturo; periodigo; esperanta literaturo.

**Resumo**
A literatura esperantista possui características bem específicas, resultantes de especificidades da língua e de sua cultura: autores e leitores que pertencem a diferentes meios culturais, o papel do Esperanto como segunda ou terceira língua de quase todos os seus falantes, ao mesmo tempo em que desenvolvem uma cultura própria ligada à língua e à sua comunidade internacional de falantes. A periodização da literatura esperantista se revela um grande desafio pela dificuldade em distinguir momentos e eventos que influem

21 É mestrando em Teoria e História Literária pela Universidade Estadual de Campinas – UNICAMP e Graduado em Estudos Literários pela UNICAMP.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

decisivamente essa literatura como um todo. É evidente um maior consenso entre os autores dedicados a este tema no que diz respeito aos períodos mais antigos, enquanto as divergências mais agudas se referem aos períodos mais recentes, aparentemente em consequência da dificuldade de se compreender fenômenos que ainda ocorrem ou cuja influência ainda não foi suficientemente compreendida.
**Palavras-chave:** Esperanto, literatura, periodização, literatura esperantista

## Enkonduko

Periodigo de Esperanta literaturo estas tasko certe malfacila pro la diversaj specifaĵoj de esperanta literaturo, kies aŭtoroj apartenas al diversaj kulturaj medioj kaj havas malsamajn denaskajn lingvojn. Se en studoj de naciaj literaturoj oni konsideras gravajn historiajn okazaĵojn, kiuj forte influis la socion de tiu lando, kiel momentoj de transiro inter du malsamaj periodoj de tiu literaturo, nature ni povas pensi pri eventoj kiuj profunde markis la esperantan komunumon kiel markiloj, tamen tio ne sufiĉas: ankaŭ necesas kontroli ĉu tiu evento ja influis la evoluon de esperanta literaturo, kiu siavice spegulas la evoluon de la propra esperantistaro kiel komunumo.

Interkonsentoj kaj diverĝoj inter esploristoj kiuj klopodas periodigi la esperantan literaturon estas tre interesaj por pristudado de la temo kaj kompreno de kiuj estas la kernaj punktoj en historiografio de esperanta literaturo. Per komparado de kelkaj studoj pri la temo kaj ankaŭ analizante la kialojn de



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

la diverĝoj eblas pli kritike analizi la problemon.

**La Unua Periodo**

Sutton (2007, 131) atentas pri tio, ke kvankam literaturistoj interkonsentas pri la neceso dividi la Esperantan literaturon en periodoj, ili diverĝas pri kiam kaj kial dividi. Li mem sin dediĉis al tiu temo kaj analizis la periodigon laŭ pluraj aliaj aŭtoroj por fari sian propran proponon. Laŭ Sutton, la Unua Periodo iras de 1887, kiam estis publikigita la Unua Libro[22], ĝis 1920; la Dua Periodo de 1921 ĝis 1930; la Tria Periodo de 1931 ĝis 1951; la Kvara Periodo de 1952 ĝis 1974; kaj la Kvina Periodo de 1975 ĝis nun.

Pri la komenco de la Unua Periodo oni apenaŭ povas malkonsenti: la Unua Libro atestas la naskiĝon ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de ĝia literaturo. Eventuale oni povas aserti ke Zamenhof verkis en Esperanto antaŭ 1887, tamen nur ekde la publikigo de la Unua Libro literaturo en Esperanto efektive fariĝis konata kaj komencis disvolviĝi. Pri la fino de la Unua Periodo, William Auld (Sutton 2007, 132), en la unua eldono de *Esperanta antologio: poemoj*, konsideras 1920 kiel komenco de la Dua Periodo, tamen en la dua eldono li redifinas la jaron al 1921, pro la publikigo de la unua poemaro de Kálmán Kalocsay,

22 La unua lernolibro de Esperanto, konsiderata kiel naskiĝ-atestilo de la lingvo. Per tiu libro L. L. Zamenhof lanĉis Esperanton al la mondo. Ĝi markas la naskiĝon de esperanta movado kaj ĝia literaturo (poemoj de Zamenhof en Esperanto estis publikigitaj en tiu libro kiel specimenoj de originala literaturo en la nova lingvo).



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

*Mondo kaj koro*.

Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer (Minnaja kaj Silfer 2015, 1) interkonsentas kun Auld kaj Sutton pri la Unua Periodo. La fakto, ke kelkaj aŭtoroj konsideras 1920, aliaj 1921 kiel fino de la Unua Periodo, estas negrava detalo, ĉar ili interkonsentas pri la fundamenta punkto: 1921 estis la transira jaro, kiam debutis Kalocsay, kaj sekve Julio Baghy, Raymond Schwartz, Eŭgeno Miĥalski kaj Nikolao Hohlov (Auld, citita laŭ Sutton 2007, 132). Pietläinen (2003) atentigas pri la forpasoj de Zamenhof kaj Antoni Grabowski (tiu lasta ĝuste en 1921), kaj malmultigo aŭ ĉesigo de verkado de aliaj influaj aŭtoroj kaj tradukistoj de la Unua Periodo[23]. Evidente estas tre bone difinita transiro inter generacioj de aŭtoroj. Sutton (2007, 133) prave substrekas tion, ke Auld donis fortan pezon al poezio en siaj kriterioj, tamen agnoskas Kalocsay kiel la plej grava aŭtoro de la Dua Periodo kaj pro tio sekvas la Auld-an kriterion. Statistika analizo de Pietiläinen (2003, 125) pravigas la gravecon de poezio en la Unua Periodo: antaŭ 1920 nur sep originalaj romanoj estis publikigitaj en Esperanto, kontraŭ 11 inter 1920-1929. Mankas fidindaj datumoj pri la vigleco de alispecaj prozaĵoj en tiu periodo.

23 Pietiläinen donas specialan atenton al la influo de tradukistoj, menciante Zamenhof, Grabowski kaj Kazimierz Bein (Kabe). Tiu atentigo estas prava, ĉar en la Unua Periodo tradukita literaturo ludis gravan rolon en la kreado de verkostilo esperanta. Mi miras pri tio, ke ankoraŭ hodiaŭ esperantistoj dum varbado de la lingvo forte substrekas la ekziston de tradukita literaturo en Esperanto, fenomeno apenaŭ rimarkebla en varbado de naciaj lingvoj.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

**La Dua Periodo**

Estas interkonsento, almenaŭ inter la plej konataj aŭtoroj kiuj sindediĉis al periodigo de Esperanta literaturo, pri tio, ke la Dua Periodo komenciĝas en 1921, kun la publikigo de la unua libro de Kalocsay. Dum la sekvaj jaroj debutis aliaj aŭtoroj, aperis diversaj skoloj, inter ili la Budapeŝta Skolo, kreita ĉirkaŭ la revuo *Literatura Mondo*, kaj ankaŭ prozo pli vigliĝis. Minnaja kaj Silfer (2015, 105) konsideras la Duan Periodon inter 1921 kaj 1937, kaj substrekas la influon de SAT[24] en la tiutempaj movado kaj literaturo.

Sutton (2007, 133), konsideras kiel fino de la Dua Periodo la jaro 1930, dum Auld (apud Sutton 2007, 133) en la unua eldono de *Esperanta Antologio: Poemoj* konsideris la Duan Periodon inter 1919 kaj 1939, tamen en la dua eldono redifinis ĝin al inter 1921 kaj 1931. Rilate al la fino de Dua Periodo, la pli frua propono de Auld pli kongruas kun tiu de Minnaja kaj Silfer, dum lia posta propono kongruas kun tiu de Sutton. Pietläinen (2003, 122-128), siavice, difinas la Duan Periodon inter 1920 kaj 1945, tamen substrekas la grandan influon de la persekutoj al Esperanto, komence en Germanio, ekde 1930, kaj sekve ankaŭ en aliaj landoj, en Esperanta literaturo.

Evidente, la fino de la Dua Periodo estas polemika afero. Ĉu literaturo evoluas tion rapide, ke eblas konsideri jardekon kiel periodo? Mi ne konas periodon tiom rapidan en

24 Sennacieca Asocio Tutmonda, fondita en 1921 kiel organizaĵo de la Laborista Esperanto-Movado.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

nacia literaturo, tamen eblas facile konstati ke Esperanta literaturo ja maturiĝis tre rapide, se ni konsideru ke de 1887 ĝis la nuno ĝia stato evoluis de "Primitiva romantismo kaj fondo de stilo" al "Eksperimenta poezio kaj Popularigo de la romano" (Sutton 2007, 132). La romantikismon de la Unua Periodo pravigas la utopiemo de la unuaj esperantistoj, dum tiamaj naciaj literaturoj estis pli avangardaj; nuntempa Esperanta literaturo, tamen, evoluas en sinkroneco kun naciaj literaturoj.

Sutton (2007, 134) defendas 1930 kiel fino de la Dua Periodo pro la konstato, ke inter 1930 kaj 1933 aperis aro da ŝlosilaj verkoj, kiuj estas influaj ankoraŭ hodiaŭ. Minnaja kaj Silfer ankaŭ agnoskas la influon de tiuj verkoj kaj ilin mencias kiel grava parto de la transiro inter la Dua kaj la Tria periodoj, tamen konsideras ilin kiel parto de la fino de la Dua Periodo. La diverĝo inter Minnaja/Silfer kaj Sutton ŝajne havas kiel kerna punkto la revuo *Literatura Mondo*: laŭ Sutton, la dua fazo de tiu revuo (1931-1939) apartenas al nova periodo, dum Minnaja/Silfer ŝajne elektis tiun revuon kiel simbolo de la Dua Periodo. Atenta esploro pri la diferencoj inter ambaŭ fazoj de tiu revuo povas aldoni gravajn elementojn al la debato pri periodigo, tamen restas demando malfacile respondebla: ekde kiam persekutoj al Esperanto kaj la eldonado de pluraj gravaj verkoj komence de 30-aj jaroj efektive influis Esperantan literaturon? Silfer asertis en *Literatura Foiro*, ke "de post 1935 ekzistis maturaj literaturaj kaj esperantologiaj rimedoj, kiuj mankis ĝis

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

tiam" (Citita laŭ Sutton 2007, 134). Ŝajnas malfrua por la fino de la Dua Periodo la jaro 1937, kiel proponis Minnaja/Silfer, verŝajne motivitaj de konvinko apartenigi la duan fazon de *Literatura Mondo* al tiu periodo. Malfacilas, tamen, elekti specifan jaron, ĉar ĉifoje la transiro ne estas tiom evidenta kaj oni povas iom libere elekti simbolan okazaĵon inter 1930 kaj 1935.

**La Tria Periodo**

La diverĝoj pri la komenco de la Tria Periodo jam estis traktitaj en la diskuto pri la Dua Periodo, tamen kio pri ĝia fino? Laŭ Minnaja kaj Silfer (2015, 227) ĝi iras ĝis 1952, dum Sutton (2007, 134) opinias ke ĝi finiĝas unu jaron pli frue. Auld (Apud Sutton 2007, 133) konsideris 1956 kiel lasta jaro de la Tria Periodo, kaj Pietiläinen tre diverĝas de la aliaj menciitaj aŭtoroj: laŭ lia propono tiu periodo iras ĝis 1974! Kialo por tiu diverĝo estas simpla: la Pietiläinen-a Tria Periodo entenas la Trian kaj la Kvaran Periodojn laŭ la aliaj aŭtoroj: ili ĉiuj krom Auld interkonsentas pri fino de literatura periodo komence de la 1970-aj jaroj.

Minnaja kaj Silfer kaj Sutton interkonsentas pri la transiro en 1952 pro la samaj kialoj: la ĉeso de *Literatura Mondo*, la fondo de la eldonejo Stafeto[25] kaj la eldono de

25 Tiu eldonejo ludis kernan rolon en eldonado de esperanta literaturo inter 1952, kiam ĝi aperigis *Kvaropo*-n, kaj 1975, kiam ĝi publikigis sian lastan libron, *Patrina koro*, de Nevena Nedelĉeva. Stafeto pagis la eldonkostojn de la debuta verko de multaj novaj aŭtoroj kaj tiel rivelis elstare



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

*Kvaropo*, debuta verko de William Auld, J. S. Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti, fondintoj de la Skota Skolo, forte influa en tiu epoko. Auld, en la dua eldono de *Esperanta Antologio: Poemoj*, konsideris kiel inaŭgura verko de la Kvara Periodo sia propra verko *La Infana Raso*, publikigita en 1956 (Sutton 2007, 133-36). Vilmos Benczik bone traktis la temon en *Studoj pri la Esperanta Literaturo* (1980, 116): *La Infana Raso* estis la ĉefa verko de la Tria Periodo, sed la influo de la Skota Skolo komenciĝis per la publikigo de *Kvaropo*.

Post tiuj konsideroj, ŝajnas evidenta la komenco de la Tria Periodo en 1952. Mankas, tamen, scii kial Pietläinen ne konsideras tiun momenton kiel inaŭguro de nova periodo. Li klarigas, ke la fino de la Dua Mondmilito markas la komencon de la Tria Periodo pro la profunda influo de sinsekvoj de la milito (efiko de persekutoj kontraŭ Esperanto antaŭ kaj dum la milito, la Malvarma Milito kaj la divido de Eŭropo en du landogrupojn) en esperanta kulturo. Li mencias tion, ke *Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo* aperis post la fino de *Literatura Mondo*, kaj en tio estas subkomprenata la ideo, ke unu revuo simple anstataŭis la alian, kvazaŭ temis nur pri ŝanĝo de nomo kaj presejo. La aŭtoro bedaŭrinde ne atentas pri la specifaĵoj de tiuj revuoj, ĉiu kun sia aparta identeco kaj historia kunteksto.

Pietläinen vidas ŝanĝon en la esperanta literaturo nur en la 1960-aj jaroj, pro la malstreĉiĝo en internaciaj

talentajn verkistojn.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

rilatoj kaj ŝtata subtenado al la esperanta movado en kelkaj landoj. Li ankaŭ atentas pri la apero de gravaj aŭtoroj en pluraj landoj ekstereŭropaj, sed ne mencias la fondiĝon de Stafeto, kiu ebligis la debuton de multaj el tiuj novaj aŭtoroj, kaj citas Auld, laŭ kiu la Skota Skolo en *Kvaropo* sekvis modelon de *Parnasa Gvidlibro*, por pravigi sian teorion, ke la Tria Periodo estis multsence daŭrigo de la Dua (Pietiläinen 2003, 122-128). Evidente li per tiu komento nuligas la transforman rolon de la Skota Skolo, sekve kunigas la Trian kaj la Kvaran periodojn poponitajn de aliaj aŭtoroj.

**La Kvara Periodo**

Jam estis menciita la elekto de Pietläinen kunigi la Trian kaj la Kvaran periodojn proponitajn de aliaj aŭtoroj, tiel ke por li la Kvara Periodo korespondas al tiu, kiun aliaj aŭtoroj nomas Kvinan Periodon, kaj ĝin ni traktos poste. Minnaja kaj Silfer (2015, 255) proponas kiel Kvara Periodo tiu inter 1952 kaj 1970, alivorte de *Kvaropo* ĝis la unua eldono de PIV[26]. La aŭtoroj substrekas la laboron de Ivo Lapenna en UEA-estraro (1937-1974) kaj la Rezolucio de Unesko en Montevideo, en 1954, kiuj forte influis la movadon. La fino de tiu periodo koincidas kun la Deklaracio de Tyresö, per kiu TEJO sin deklaras kontraŭ tiama lingvopolitiko de UEA surbaze de sinteno pri lingva

26 Plena Ilustrita Vortaro, la plej granda vortaro de Esperanto, kun detalaj difinoj kaj ekzemploj pri la uzo de la vortoj, ekde tiam ludas gravan rolon en normigo de la lingvo.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

diskriminacio. Specife kadre de literaturo, markas la Kvaran Periodon la periodaĵoj *Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo* kaj la vigla eldona laboro de Stafeto.

Sutton (2007, 136) substrekas la mankon de interkonsento pri kiam komenciĝas la Kvina Periodo, kaj akceptas la argumentojn de Verloren van Themaat kaj Pietiläinen pri komenco de nova periodo en 1975 per la publikigo de *Neologisme* de Lorjak, la fermo de *Norda Prismo* kaj la ekmultiĝo de literatura eldonado komence de la 1970-aj jaroj. Li mem ne aldonas propran kialon por tiu elekto.

Ne estas klara por mi la kialo de la elekto de Auld pri 1982 kiel lasta jaro de la Kvara Periodo[27]. Tamen, analizo de la periodigoj proponitaj de li evidentigas tion, ke li tre emfazas poezion, kiu estis la kerno de Esperanta Literaturo en la unuaj du periodoj, dum proza verkado iom post iom vigliĝis, kaj ekde la sepdekaj jaroj fariĝas speciale vigla, kun 53 originalaj romanoj eldonitaj inter 1970 kaj 1989 (Pietiläinen 2003, 125). Auld komence proponis periodigon surbaze de la Mondmilitoj, sekve serĉis aliajn faktorojn, sed neniam sukcesis vere liberiĝi de la milita kriterio, kaj post 1945 enmovadaj okazaĵoj fariĝas multe pli influaj en la movado ol tiuj ekstermovadaj. Finfine, Auld-aj kriterioj ŝajnas al mi pli subjektivaj ol ili devus esti.

Pietiläinen (2003, 124) atentigas pri krizo en la

27 Mi ne havis oportunon konsulti la librojn menciitajn en la verkoj de aliaj aŭtoroj, kie verŝajne troviĝas pli detalajn klarigojn.

2016 – Ano II – Volume II – Número VII ISSN – 2358-7482



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj neniam atribuis premion de prozo inter 1969 kaj 1975 kaj en 1973-74 atribuis unuan premion en neniu branĉo. Ekde 1976 Belartaj Konkursoj revigliĝas sub nova juĝkomisiono, nova generacio de partoprenantoj kaj novaj reguloj, kaj premiado denove ekfloris. Certe meze de la 1970-aj jaroj ne mankis elementoj kiuj pravigas inaŭguron de nova periodo en Esperanta literaturo.

**La Kvina Periodo**

Tiun ĉi periodon, kiun Pietiläinen nomas Kvara, daŭras ĝis nun laŭ Auld, Sutton kaj Pietiläinen. Tiu lasta asertas ke tiun ĉi periodon aŭguris la apero de PIV, en 1970, sed konsideras 1975 kiel ĝia efektiva komenco. Fakte la PIV-a efiko en Esperanta Literaturo ne estis tuja, tiel ke 1975 ŝajnas pli taŭga dato. Tamen, Minnaja kaj Silfer konsideras la Kvinan Periodon inter 1970, lanĉo de PIV kaj *Literatura Foiro*, kaj 1993, kiam Esperanto estis agnoskata kiel literatura lingvo dum la PEN-mondkongreso. La aŭtoroj kreditas al *Literatura Foiro* tiun atingon, kaj asertas ke la tuta Esperanta literaturo estis sub ĝia influo dum tiu periodo. En 1993 estis publikigita la poemaro *Ibere Libere*, debuta verko de la Ibera Skolo, kunverkita de Miguel Fernández, Liven Dek, Jorge Camacho kaj Gonçalo Neves, kaj ĉesis la literatura konkurso Internaciaj Floraj Ludoj[28].

28 Jara esperanta beletra konkurso kreita en 1911, kies influo en esperanta literaturo certe ne estis tiom granda kiel proponas Silfer, unu el la premiitoj en tiu konkurso.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Minnaja kaj Silfer estas italoj kaj kunfondintoj de *Literatura Foiro*, eble pro tio ili sentas tiujn jarojn kiel "Itala Periodo" de Esperanta Literaturo, ĝuste pro ilia persona sperto, tamen Pietiläinen pli bone priskribas tiun periodon, atentante pri fragmentiĝo de Esperanta Literaturo: estis kvanta kresko da verkado, tamen mankas aŭtoroj kaj revuoj en kerna rolo. Minnaja kaj Silfer ŝajne troigas ilian propran fragmenton de la tuto.

Tamen, Minnaja kaj Silfer (2015, 485) admonas ke "la lastaj dudek jaroj ne povas aspiri al klasado kiel 'literatura periodo', ĉar, se oni povis elekti eventon kiu fiksu precizan komencon, nenio ĝis nun anonciĝas tiel grava por roli kiel periodfina punkto". Sekve, ilia decido krei Sesan Periodon estis pro alia celo ol literatura periodigo, supozeble tiu divido de la Kvina Periodo en du partoj celas didaktikan rolon prezenti esperantan literaturon al nefakuloj, substrekante la rolon de *Literatura Foiro* ĝis 1993, kaj sekve novan fonon en Esperanta kulturo, kiun ili priskribas kiel "de lingvaj rajtoj al lingvo reta". Debatoj pri lingvaj rajtoj kaj popularigo de Interreto ja kreas novan formon de esperanta movado, revolucias la distribuon de verkoj, faciligas komunikadon kaj eventuale ŝanĝas la rolojn de la parola kaj la skriba formoj de la lingvo en movadaj diskutoj. Tio aŭguras novan periodon en esperanta literaturo, tamen ankoraŭ ne eblas klare trovi transiran momenton, samkiel okazas en naciaj literaturoj: periodigon oni kreas per analizo de la pasinto kaj ĝia influo en la nuno, tiel ke ankoraŭ estas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

frue por kompreni kiel tiu literaturo evoluos kaj de kiuj faktoroj tiu evoluo dependas.

**Konkludo**

La Unua Periodo komencas per la lanĉo de la Unua Libro, en 1887, kaj finas en 1921. La mortoj de Zamenhof kaj Grabowski kaj la kabeo de Kabe draste reduktas la influon de tiu unua generacio de aŭtoroj, kaj ilin anstataŭas nova generacio kiu sinprezentas en 1921 per publikigo de la unua poemaro de Kalocsay, kiun sekvas la apero de *Literatura Mondo* kaj la Budapeŝta Skolo, dum ekster Hungario aliaj skoloj ankaŭ debutas.

Fino de la Dua Periodo ne estas tiom okulfrapa: 1930 ja estas grava jaro pro la apero de diversaj verkoj kiuj influos la sekvan generacion kaj ankaŭ pro la ekesto de la persekutoj al Esperanto en Germanio, sekve ankaŭ en aliaj landoj. La efiko de tiuj verkoj kaj de la persekutoj al Esperanto certe ne estis tuja, tamen tre forta, kaj la inaŭguro de la dua fazo de *Literatura Mondo* en 1931 estas tre oportuna momento por inaŭguro de la Tria Periodo, kiam efikoj de 1930 sin manifestas.

En 1952 komenciĝas la Kvara Periodo, kaj abundas kialoj por tio: la fino de *Literatura Mondo,* la fondo de Stafeto kaj la publkigo de *Kvaropo* anoncas ĝin. La fino de tiu periodo estas iom neklara, sed inter 1970, lanĉo de PIV kaj *Literatura Foiro*, kaj 1975, publikigo de *Neologisme* kaj fino de *Norda Prismo*. *Neologisme* estas literatura verko, dum PIV estas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

vortaro. *Norda Prismo* estas simbolo de la Kvara Periodo, dum en la Kvina Periodo la Esperanta Literaturo fragmentiĝas kaj ne permesas al *Literatura Foiro* ludi kernan rolon, tiel ke 1975 ŝajnas al mi pli taŭga jaro por la transiro. La Kvina Periodo daŭras ĝis nun.

Resume, ni havas la jenan periodigon: 1. 1887-1921; 2. 1921-1931; 3. 1931-1952; 4.1952-1975; 5. Ekde 1975.

Bibliografio

Benczik, Vilmos. **Studoj pri la Esperanta Literaturo** . Takasago-si: La Kritikanto, 1980

Minnaja, Carlo, kaj Silfer, Giorgio . **Historio de la Esperanta Literaturo** . La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2015

Pietläinen, Jukka. “La kvara periodo en Esperanta literaturo” . *In* Lipari, Michela, kaj Tonkin, Humphrey . **Pri homoj kaj verkoj: Eseoj pri la Esperanto-kulturo** . Roterdamo: UEA, 2012. p. 121-129.

Sutton, Geoffrey. “Pri la periodoj de la Esperanta literaturo” . *In* Lipari, Michela, kaj Tonkin, Humphrey. **Pri homoj kaj verkoj: Eseoj pri la Esperanto-kulturo** . Roterdamo: UEA, 2012. p. 131-139.